

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Sukcesis la 104-a Japana Esperanto-Kongreso

De la 3-a ĝis la 5-a de novembro 2017, okazis la 104-a Japana Esperanto-Kongreso en urbo Jokohamo, ĉe *Kanagaŭa-Rodo-Plaza* (Placo por Labor-aferoj en Gubernio Kanagaŭa). Al ĝi aliĝis 459 personoj, kaj el ili 331 personoj efektive vizitis la kongresejon. El ili estas 23 personoj el 11 landoj ekster Japanio. La kongreso estis kunorganizita de Japana Esperanto-Instituto (JEI) kaj NeProfitocela Organizo Esperanto Jokohama. La kongreso havis temon "Haveno peras, Esperanto peras", kaj s-ro Dieter Kleemann faris tiuteman prelegon en la Inaŭguro. La kongreson

aŭspiciis i.a. Pola Instituto en Tokio, okaze de la 100-jara mortoĵaro de L.L.Zamenhof, invitis s-ron Robert Kaminski el Pollando prelegi pri L.L.Z en la Ferma Ceremonio, kaj oferis 18-panelan ekspozicion pri L.L.Z. kaj Eaperanto. Kiel ĉi-jara specialaĵo, okazis fakkunsido pri la Komputila Ludo "Kotonoha Amrilato", en kiu ludo lingvo nomata Juliamo, fakte Esperanto, estas uzata kiel lingvo de nekonata mondo. 6 prelegoj en la kadro de "Hamologio", t.e. studo pri Jokohamo, ankaŭ allogis la kongresanojn.



ilustrita de s-ino Miyazaki Hideko





s-ro Kimura Goro Christoph



s-ro Dieter Kleemann



la tri aziaj invititoj



Jokohama-Fratinoj



Miksita Bando de Juka-Bossa



ekspozicio



ekskurso ĉe krozŝipo  
(foto de s-ro Jamada Tadaŝi)



s-ro Robert Kaminski



Jokohama Akvo



s-ro Fuse Kentaro

---



---

## Eseo pri la Kongreso

---



---

### Mirindaj Junuloj

Mizro Iwaya

En la lasta Japana Kongreso mi vidis du mirindajn junulojn. Unu estas Totono, Tran Tuan Nghia el Vjetnamio, kaj la alia estas Alberto, Albert Stalin Garrido Tancinco el Filipinoj. Ili komencis lerni Esperanton antaŭ ĉ. kvar jaroj kaj jam bone parolas ĝin.

Totono, 23-jara ĉiĉerono de la angla lingvo, prelegis pri juneco. Li prezentis per komputilo diversajn fazojn de juneco, citante eldirojn el diversaj fontoj. Fojfoje li demandis nin, kiel ni opinias pri lia aserto, kredeble por altiri atenton al la parolado. Li diris ke li deziras profesie labori en Esperanto, aldonante ke esperantolingva ĉiĉerono estus la idealo.

Alberto, juna studento, virtuale gvidis nin tra Filipinoj. Antaŭ ĉio li diris, "Imagu, ni estas nun en turisma buso de Filipinoj". Sekvis sur la ekrano diversaj vidindaĵoj en Filipinoj. La scenoj mem estis sufiĉe belaj kaj interesaj. Ne mankis klarigoj pri la karakteroj de respektivaj regionoj en la lando. Precipe lia sciigo, ke ekzistas pli ol cent lingvoj en la malvasta lando, surprizis nin.

Ili ambaŭ montris bonan talenton de modela prezentado. Ili manipulis komputilon lerte. Mi ofte aŭdas ke bona prezentado devas esti tia kaj tia. Ŝajnas al mi, ke la maniero de la du junuloj ĝuste taŭgas al la instrukcio. Kiel ili lernis ĝin? Supozeble tra ofta praktikado. Praktiko pli utilas ol lecionoj.

Mi fakte ne scias ĉu aliaj junuloj en Vjetnamio kaj Filipinoj bone plenumas prezentadon. Nur unu fakto estas certa ke ili sufiĉe mirigis min per sia verva kaj memfida sinteno.

plej dekstre: Totono  
dua de maldekstre: Albert

## Tiel Okazis

\*Internacia Festo 2017

Tempo: la 8a kaj la 9a de oktobro

Loko: Parko 'Gran Mall' en la areo Minato Mirai

Ni partoprenis 2 tagojn el la 3-taga evento organizita de la civitana grupo por internaciaj aferoj. Ni starigis tendon kun afiŝoj pri Esperanto, flugfolioj kaj informis pri Esperanto al la preterpasantaj interesitoj

\*Prepares al la Japana Kongreso.

(1) Hama-Ronda Vespero, en la 21a de oktobro en la kutima kunvenejo

(2) Speciala Prepar-Kunsido, en la 29a de oktobro, ĝuste en la Kongresejo

Ni havis kunvenojn en kiuj ni priparolis labordividon ĉe la venonta 104-a Japana Esperanto-Kongreso. Ekzemple, vojqvidantoj starantaj ĉirkaŭ la plejproksima stacidomo, deĵorantoj ĉe ĝiĉeto kaj pakaĵdeponejo, enkondukantoj ĉe prelegoj, preparantoj de tagmanĝoj, ktp ktp.

## Niaj Planoj

\*Zamenhof-Festo de Kanagaŭa

Tempo: la 17a de decembro, 13:30-17:00 (poste, Festeno)

Loko: Internacia Centro de Kaŭasaki, en Urbo Kaŭasaki

4 rondoj en Gubernio Kanagaŭa, nome ni en Jokohamo, Kaŭasaki, Fuĵisaŭa kaj Odaŭara kunvenos. Interalie estos prezento de la tradukaĵo "Nanjoj en domo kun granda zelkovo" de la tradukinto, s-ino Itabaŝi Micuko.







Okaze de la kongreso, s-ro  
Maekawa Haruya aranĝis  
memorajn poŝtmarkojn.



memora poŝtstampo



La 104-a Japano Esperanto-Kongreso, 3a-5a novembro 2017, Jokohamo